

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jarà abono Kĉ 20.—, eksterlande Kĉ 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kĉ 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Jos. Brožík, Plzeň, Prokopova tř. 9. — Konto de la Pošta Sparkaso ĉs. n-ro 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono 718/VIII. La manuskriptojn oni ne resendas.

LA DEZIRON DE FELIĈO DUM LA KRISTNASKO KAJ EN LA NOVA JARO 1923

al siaj kunlaborantoj, abonantoj kaj
legantoj sindoneme esprimas
redakcio kaj administracio de
LA PROGRESO

DUDEK JAROJ DE ĈEĤA ESPERANTISMO.

La ĉefa esperantista societo ĉeĥoslovaka »Esperantista Klubo en Praha« festis sian 20-jaran daŭron la 10. dec. t. j. La Klubo de Praha estas la plej malnova ĉs. esp. organizaĵo kaj ĉar ĝia historio estas senpere ligita kun la tuta movado esp. de Bohemujo, tial en Praha oni samtempe festis dudek jarojn da ĉeĥa esperantismo.

Dudek jarojn! Ĉu oni prezentis al si kiom da senprofita laboro kaj da senlaca propagando faris dum tiu tempo la fondintoj de la ĉeĥa movado: fratoj Kühnl, d-ro Kamarýt, geedzoj Kraus, moraviaj herooj instr. Ĉejka kaj Krompholz kaj kelkaj aliaj, kiuj ankoraŭ nun estas same sindonaj pioniroj de Esp., kiel antaŭ dudek jaroj? Festante la jubileon de Esp. Klubo de Praha ni devas memori ankaŭ ĉi tiujn verajn heroojn de nia movado kun dankemo kaj admiro de ilia laboro. Ĉu la granda vico de niaj nuntempaj propagandistoj restos fidela al nia movado dum du jardekoj? ..

Je la deka matene, la 10. dec., malfermis la festan ĝeneralan kunvenon de la Klubo (en la halo de d-ro Grégr en la Reprezenta domo de Praha) ĝia nuna tre simpatia

prezidanto prof. J. Eiselt, menciante la signifon de la jubileo. Precizan kaj interesan historion de la Klubo prezentis s-o kons. K. Procházka, aludante ankaŭ la iaman, danke al dio jam forpasintan malakordon inter la membraro de la Klubo. Pri la nuna situacio de esp. movado, tiom diferenciganta de la stato antaŭ dudek jaroj, parolis la ĝen. sekret. de ĈAE. s-o R. Hromada. La estontecon de Esp. hele kaj interese skizis prof. Kamarýt. Per li estis elĉerpita la vico de oficialaj oratoroj kaj nun la reprezentantoj de diversaj korporacioj povis prezenti siajn alparolojn. Ili estis: Mírová společnost Chelčický (Porpaca asocio Helčický), »Verda Stelo« la societo de germ. esp. en Praha; pri la signifo de Esp. en la propagando de naciaj penadoj parolis la ĉefkom. de Komerca min. s-o A. Pitlík. Salutleterojn sendis: Administra komisiono de Praha kaj Esp. soc. el Nymburk. Telegramojn: Sekcio de Germ. ligo esp. en Liberec, Esp. soc. »D-ro Schulhof« en Pardubice. Siajn ofic. reprezentantojn sendis: Sinjorina esp. rondeto en Praha, Esp. societo en Jičín, Esp. klubo kaj la Popola universitato de Plzeň, Esp. soc. de Hradec Král., Societo de nevidantaj esperantistoj en Praha (jen prof. Stejskal prezentis historion de Esp. inter blinduloj). Fine estis akceptita rezolucio akcentanta ĝeneralan intereson de la publiko pri la internacia lingvo, dume la oficialaj rondoj malatentas la gravecon de Esp. Tial oni akcentis la neceson, ke la ŝtataj oficoj atentu Esp. laŭ la valoro, kiun ĝi havas por sukcesa propagando de ĉs. aferoj kulturaj.

Vespere estis aranĝita »akademio« en la halo de Sladkovský en la Reprezenta domo kun tre riĉa programo.

Enirante en la trian dekjaron de nia movado ni faru la promeson, ke ni ne forlasos Esperanton antaŭ ĝia fina venko! Per komunaj fortoj ni venkos!

FR. FREMR:

LUMO EL ORIENTO.

(Artikolo originala.)

Granda intereso, kiun renkontis la sciencaj laborantoj sur la kampo de orientaj sciencoj, elkreskis dum la lastaj dekjaraj tre ĝojige. Ĝi estu en la fako de asiriologio kaj egiptologio — kie jam en la pasinta centjaro profitis gravajn meritojn Delitsch, Schrader, Niebuhr — aŭ en la historio de pli malnovaj naciecaj triboj, Sumeroj kaj Ĥetitoj. Jen gravan sukceson trovis s-o Hrozný, la nuna profesoro de la universitato en Praha, kiu en komenco de la mondmilito solvis la malfacilan kaj tre komplikitan ĥetitan skribon. En ĉiuj branĉoj admirinde elkreskis ne nur la riĉa materialo, sed eĉ la rezultatoj de la penigaj laborejoj kaj la aprobo, kiun la scienculoj trovas en vastaj rondoj populaj. Multenombraj asocioj, revuoj kaj historiaj studoj, kiuj aperis en Anglujo kaj Germanujo post la lastaj jaroj de la pasinta jarcento, disvastigis helan konon kaj pli precizan scion en simpla popolo pri la miljaraj fontoj de hindoeŭropa kulturo.

La pramalnovaj historioj, kiujn oni devas ĝis hodiaŭ rigardi nur el vidpunkto de la duba fidinda Pentateŭko kaj de la ceteraj hebreaĵoj verkoj, leviĝis nun — post la ampleksaj esploroj de oferemaj esploristoj — el polvo de forgeso sur taglumon. Kaj ni vidas: la moderna kritiko, kiu tiom distingas la francajn deistojn kaj racionalistojn de la dekoka jarcento en aferoj kompreneble pure religiaj kaj intelektaj, unuigita kun nekutima intereso pri

la disvastigo de scioj en tiu ĉi direkto, donis tian amasegon da materialo kaj tiom riĉan rikolton, ke oni bezonis tutajn vivdaŭrojn por ampleksi ĉiujn fakojn kaj por ordigi la tutan grandegan materialon.

Justin Prášek (kiu antaŭ kelkaj monatoj iestis sian sepdekan naskiĝdaton) en sia dudekjara verko ĝuste skribis, ke la historio de la orientaj nacioj atingis samdevenan signifon kun la historio de la nacioj klasikaj. Mireginda mondo sin malfermas antaŭ nia vidsento: La larĝaj ebenaĵoj de Babelo, Akadio kaj de la afrika Nil-teritorio reviviĝas per bruoj de armeoj. La plej malnovaj monumentoj de la homa klereco, la obeliskoj kaj ŝtonaj libraroj de Asurnasirpal kaj Chammurabi parolas per fieraj vortoj pri la gloro de siaj imperiestroj, pramalnovaj diejoj kaj sanktejoj malfermiĝas sub la tuŝo de flugiloj de la nova epoko — senhalta leĝo de la progreso ne nur kondukas antaŭen, sed ĝi montras ankaŭ la fontojn, kie oni povas fondi ekkonon de antikva kulturo kaj historio.

Eminentan sukceson gajnis la evoluo de nia sciado pri la historio de malproksima Oriento pere de gravaj elterigoj, kiujn oni entreprenis en diversaj direktoj je kostoj de oferemaj individuoj ne ŝparantaj monon kaj konkretajn fortojn, aŭ je elspezo de ŝtatoj. La konstanta kaj laciga batalo, kiun homo entreprenis kontraŭ la interno de la tero, alportis la plej riĉajn fruktojn. La tutan materialon tiel amasigitan oni ne povis prilabori ĝis hodiaŭ. La nekompletaj sciigoj kaj kelke da necertaj partumoj el la greka historia literaturo, el

FELIETONO

B. TITL:

EN BELGIJON.

(Fino.)

Estis jam post la 19. horo, kiam niaj piedoj ektuŝis la peronon de la stacidomo »Gare du Nord« en Bruselo. Jen atendis nin s-oj Van Vynckt, la loka instruisto kaj J. Pirnay-Demez, deleg. de U. E. A. el Verviers. Post la reciproka amika manpremo ni eliris el la stacidomo en la stratojn brile lumigitajn. Ĉiuflanke, sur frontonoj de domoj, sur tegmentoj, brulas lumreklamoj, unu post la alia ŝanĝante la koloron de sia lumo kaj donante tiel al la ĉirkaŭaĵo fabelan impreson.

Ni marŝas sur bulvardo kaj niaj flagoj vekas intereson de preterpasantoj. Subite alkuras al ni du sinjoroj. Vidante la ĉeĥoslovakajn flageton ili rapide elsaltis el tramo kaj nun ĝoje alparolas nin. Ili estas ĉeĥoslovakoj tie ĉi loĝantaj kaj invitas nin veni en sian societon, kiu ĵus nun havas sian kunvenon. Unu el ili akompanas nin en la hotelon, kie niaj afablaj samideanoj mendis por ni loĝejojn kaj la alia foriras en la societon por anonci nian alvenon. En la hotelo la afero iris tre rapide: laŭ la antaŭe preparita plano ni estis dividitaj en la preparitajn ĉambrojn kaj post la necesa tualetado ni sidigis en manĝejo de la hotelo al vespermanĝo. Ne forpasis

ankoraŭ unu horo kaj ni estis jam en la societo de niaj samlandanoj, kien ankaŭ s-o Pirnay-Demez nin akompanis.

La ĉeĥoslovaka societo en Bruselo havas sian kunvenejon en nelarĝa strato malantaŭ la magistra domo kaj ĝia membraro konsistas ĉefe el laboristoj. Agrablan impreson faris je ni la bildo de prezid. Masaryk, troviĝanta sur fronta muro kaj riĉa biblioteko de bonaj verkoj ĉeĥoslovakaj kaj germanaj. En la ĉambro estis pli ol 20 membroj, kiuj nin ĝoje akceptis, ĉar ŝajnis, ke ni kunportas parton de malproksima patrujo. Baldaŭ ni amikiĝis kaj reciproke rakontis niajn impresojn. Memkomprene la kanto ne povis manki kaj tiel baldaŭ aŭdiĝis la delikataj sonoj »Kde domov můj?«. Kaj niaj samlandanoj metis en tiun ĉi kanton sian tutan spiriton, sian delikatan sentemon...

Matene, precize je la naŭa, alvenis nia oferema gvidisto s-o Van Vynckt. Ni komencis nian promenon tra la belega kaj por ni vere interesa urbo. Jen bela konstruaĵo aŭ admirinda monumento ravis nin, jen la foiro de malnovaĵoj kaj de diversaj forfalaj logis nian atenton, jen la fama statuo de nuda, senĝene pisanta knabeto »Manneken Piss« vekas intereson de ni viroj, dum niaj fraŭlinoj ruĝaj, kvazaŭ senatente rapidas de tie ĉi »mallevante la okulojn al ĉielo«. Ni haltis ankaŭ en nia ambasadorejo, troviĝanta en »rue de la Loi«, kie bonvenigis nin ataŝeo s-o C. Žďárský kaj promesis al ni helpon de la ambasadorejo en okazo de bezono.

kiuj ni havas kelkajn legendojn en ambaŭ libroj de Ktésius, ne povis persisti sub pli severa kritiko de novepokaj esploroj. Rawlinson, Meyer, Oppert kun vico da aliaj scienculoj verŝis en ĉi tiun branĉon de la historio novan lumon per siaj detalaj esploroj de ĉiuj pramalnovaj skriboj. Ili ne lasis sin fortimigi pro grandegaj malfacilaĵoj koncerne lingvon kaj monrimedojn — kaj tiel la tago kiam estis eble la unuan fojon konsciiĝi pri la enhavo de la misteraj argilaj tabuletoj, estis vere unu el la plej gravaj triumfoj de la tuta homaro.

Tre interesa estas ankaŭ la komparo de kelkaj bibliaj sciigoj kun la rezultoj de plej malnovaj trovoj en antikva Mezopotamio, kiel ekzemple faris Chamberlain. En la ampleksa biblioteko de Asurbanipal, kiu estis malkovrita en la ruinoj de malnova Niniveh per angloj Rassam kaj Loft, oni trovis longajn epopeojn pri Gilgamiŝ, pri la uruka*) reĝo Namrasit, pri la supreniro de diino Ištar en tartaron, sed ĉefe la rakonton pri la diluvo de la mondo. La eminenta geologo Süss pruvis, ke ne sole la moraleca kerno de la legendo pri savo de suripaka paŝtisto Ksisutro per la favoro de dioj, sed ĝenerale la tuta laŭvorta sciigo (eĉ en la plej malgrandaj detaloj) fariĝis fonto por estontaj aranĝistoj de Genezo.

Malgraŭ tio, ke multaj aferoj ne estas ankoraŭ klarigitaj, ni povas jam nun admiri la grandajn rezultojn. Scienca esploro progresas per rapidaj paŝoj — ideoj religiaj, aranĝo de

ŝtataj formoj kaj manieroj de vivo eĉ la kontinueco de la ĥaldeaj skribaĵoj pere de la fenika konsonanta alfabeto plialtigas la intrigon de ĉiu klerulo pri tiu ĉi ampleksa fako de la scienco.

La miljara materialo, amasigita en ĉiuj pli gravaj muzeoj de la mondo, jam hodiaŭ al ni donas sufiĉajn rimedojn, por ke ni povu fari al ni imagon pri la evoluo de historio kaj pri la vivo de Oriento. Per sistema laboro kaj nelaciĝanta diligenco de la plej bonaj scienculoj oni sukcesis forigi preskaŭ ĉiujn malhelpojn, kiuj ĝis nun ekzistis. Misteraj hieroglifoj parolas al ni hodiaŭ kiel flamaj vortoj de faraonoj, la kojnoforma skribo permesas penetri profunde en la animan laborejon, ideojn, religion, filozofion eĉ arton — kaj eble tio ĉio estas nur antaŭsento, kiel post miljaroj fartos la kulturo de la nuna homaro, kiam ĉiuj ĝiaj fieraj idoloj kaj riĉa sciado estos ankaŭ nur simila polvo kaj similaj ruinoj...

ooo

K. V. RAIS:

OFERO DE MALRIĈA PATRINO.

Maljuna Pacaĉka vivis en nia vilaĝeto, nur Dio scias, kiom da jaroj, sed tian, kia ŝi hodiaŭ estas, mi ŝin konas jam vicon da jaroj: oni diras, ke la homo ne ŝanĝiĝas de certa aĝo.

Ŝi estas malgranda, ridetema, helbluokula maljunulino, ŝia vizaĝo, iam ronda, estas nun iom akroforma, sulkiĝinta, koloro de ŝia vizaĝo blupala kaj ŝiaj lipoj vidigas senĉesan

*) Uruko, urbo en Nii-teritorio.

Post la tagmanĝo en nia hotelo mi kun s-o Brožik sidiĝis en tramon por viziti f-inon Jennen, la direktorinon de knabina lernejo. Nun mi havis la okazon uzi la restojn de mia franca lingvo, kiuj ankoraŭ estis en mia kapo. La lernejservisto enkondukis nin al la direktorino kaj nun ni denove vigle parolis esperante. Fraŭlino jam dufoje vizitis nian landon kaj ofte publike paroladas pri ĝi, ĉefe en la Brusela Popola universitato. Ŝi anoncis al ni, ke vespere okazos en kafejo »Metropol« amika kunveno de esperantistoj. Post amika adiaŭo ni denove revenas en la hotelon, kie jam la aliaj nin atendas por daŭrigi la traŭban promenadon. Nun s-o Vynckel enkondukis nin en punto-laborejon, por montri al ni la produktadon de famaj bruselaj punktoj. La mastrino detale klarigis al ni la procedon de la manufakturo kaj ni admiris la precizecon de la delikata laboro.

Vespere post la 19. ni preparis nin en niaj ĉambroj por la kunveno. Mi estis jam lacigita de la vojaĝo kaj de la dumtaga vagado kaj ŝajnis al mi, ke mi malsaniĝos. Tial mi ripozis sur lito. Subite mi ekaŭdis mian nomon kaj jam eniras el la ĉambron s-o Schoofs el Antverpeno. Mi telegrafis al li antaŭ la tagmezo ke ni alvenos pli malfrue, ol mi antaŭe anoncis kaj li tuj alveturis por atentigi min, ke la ŝanĝo de la programo estas neebla, ĉar en Antverpeno estas ĉio detale preparita. Bone, ni do restos ĉe la antaŭa programo kaj morgaŭ matene forveturos de tie ĉi. La decido estis farita kaj ni ek-

iris al la kafejo »Metropol«, kie jam kelkaj samideanoj nin atendis kaj ankaŭ s-o Žďárský de la ambasadorejo estis tie ĉi. Baldaŭ la amuzo fariĝis vigla kaj amika. Fraŭlino Jennen kaj s-o Schoofs atakas s-on Žďárský, ke li lernu Esperanton kaj li rifuzas tion por kolerigi ilin. Sed fine li submetiĝas kaj promesas lerni. Ili vokas min por esti atestanto de tiu solena promeso kaj mi diras, ke spite la promeson, mi ne kredas al li. Sed oni parolis ankaŭ serioze: Fraŭlino Jennen bonvenigis nin publike kaj mi respondis, menciante la rilatojn ĉeĥoslovakobelgajn. La tempo rapide pasis kaj ni devis adiaŭi kun la bruselanoj. S-o Schoofs ankaŭ forveturis al sia hejmo. La margaŭno ni lin sekvis.

Post nelonga veturado, je duono de la naŭa, ni alveturis en Antverpenon. En la stacidomo ni estis atendataj de kelkaj samideanoj. Inter ili estis denove la eminenta kaj eksterordinare oferema organizanto s-o Schoofs. Nia hotelo ne estis malproksima, ĝi estis nur kelkaj paŝoj de la stacidomo. Tie ni liberigis de niaj valizoj kaj tuj ni komencis traŭban promenon. S-o Swaff, la prezidanto de Esp. grupo de diamantistoj, preparis al ni surprizon: li ebligis al ni la viziton de diamantpolurejo. Li mem gvidis nin, ĉar li estas bofil de la fabrikposedanto. Certe estas, ke la tuta procedo de la prilaborado de la multekostaj ŝtonetoj nin speciale interesis. Kiam ni enpaŝis en grandan halon kun okdek polumaŝinoj ni ekaŭdis kanton de laboristoj kaj kortuŝitaj ni estis konvinkigante, ke tie ĉi laboras kelkaj sam-

afablan rideton. Ĝi vestiĝas malnovmode, nur ŝia kitelo estas jam kudrita iom laŭ modo; sed ŝiaj diverskoloraj juoj kaŝas la krurojn nur ĝis tibikarnoj kaj oni vidas malgrasajn, de maljunaĝo malheligitajn nudajn piedojn.

Pacaĉka loĝas en malriĉa ĉambreto, en kiu estas la plej necesaj restoj de la meblaro, konservita de la tempo de komuna mastrumado kun kara kapo, jam kelke da jaroj trankvile kuŝanta en tombo sur nia tombejo.

En la ĉambro estas lito kun kelke da kuŝenoj, per florpentraĵoj ornamita kesto, tablo, vazarŝranko kun teleroj kolorigitaj per abundaj rozoj kaj levkojoj, vestotenilo kaj nigra, brilanta forno.

Pacaĉka iras ĉiutage labori al bienmastroj kaj ili diras, ke ŝi estas la lasta resto de maljunaj fidelaj laboristinoj, kiuj diligente laboras. Ŝi estas, dankon al Dio, senĉese sana, la laboro ŝin hardis kaj ne laciĝas ŝin tiel, kiel maldiligentajn laboristinojn, krom tio ŝi vivas pli modeste ol ili. Se ŝi laboras kie ajn kaj kion ajn, peco da nigra pano, poto da terpomoj, fermentita brasika supo kaj dimanĉe paltkuko el neblanka faruno, fortigas la negrandan korpon de grizhara maljunulino. Dum tagmeza ripozhorio kaj vespere, kiam ŝi alvenas hejmen de la kamparo, ŝi kuiras kaj post nelonga tempo staras jam sur la tablo brilanta argila poto kun supo, el kiu gaje suprenleviĝas blankogrizaj nubetoj de simpla aromo, kiu ne allogus deligatan flarsenton de la urbaj frandemuloj.

ideanoj: ili kantis nian esp. himnon. Nia viva bruega aplaŭdo estis la respondo. Ni iris de tie ĉi forte impresitaj...

En la posttagmeza programo estis la vizito de la belege kaj interese aranĝita zoologia ĝardeno kun multaj bestoj kaj birdoj, kie ĉefe interesis nin akvujoj kun flankaj tabuloj el dika vitro, tra kiuj oni vidis multajn loĝantojn de maro. Vespere ni kunvenis kun multaj antverpenaj esperantistoj en kafejo »Anselm«. Jen estis ankaŭ s-o Isbrücker el Hago kaj unu samideano hinda, kies nomon mi forgesis. Jen oni kantis, babilis, ridis. La amuzo ŝajnis al mi tie ĉi malpli oficiala ol en Bruselo, sed pli libera, pli petola. Mi admiris la bonkorecon de flandroj kaj ilian tipan gajecon, per kiu ili tuj akiris nian absolutan simpation. Mi konstatis, ke mia antaŭa opinio pri ili estis tute falsa. En ili kuniĝas hispana gajeco kun seriozeco de nordaj popoloj. Ilia laboremo kaj sciemo estas admirindaj. Al niaj samlandanoj mi ĉiam varme rekomendos la viziton de la flandra parto de Belgujo, ĉar ni respublikanoj, povas tie multe lerni.

La sekvinta tago estis por ni plena da agrablaj surprizoj. S-o Schoofs jam matene venis al ni kaj gvidis nin en la havenon. Grandegaj ŝipoj venintaj el ĉiuj partoj de la terglobo mirigis nin kaj la grandegaj arganoj rapide leviĝantaj diversajn objektojn el ŝipoj, estis por ni, mezeŭropanoj, io admirinda. Ni malsupreniris en unu el sekaj doko, kie estis riparata ŝraŭbo de grandega ŝipo veninta el Hindujo.

Kaj tiu ĉi Pacaĉka havas filon, kiu baldaŭ povas fariĝi altranga sinjoro. Li absolvis ok klasojn de gimnazio, nun li studas jam de kelke da jaroj jurosciencon, ankoraŭ estas necese plenumi finajn ekzamenojn kaj la filo kun la patrino ĝojvokos. Kiam vivis ankoraŭ la edzo, ili havis propran dometon, sed por la filo ili ĉion oferis, eĉ la ŝtonmalmoligitajn kalojn sur la manplatoj, kiujn jam neniu laboro sukcesis sangumigi...

Sur la malnova prunarbo iel dormeme kantis la fringo kaj de la turo sonis la sonorilo; ĵus estis tagmezo.

Trotopaŝe alvenis Pacaĉka de kamparo kaj eksidis por manĝi poton da senkremigita freŝa lakto, en kiun ŝi dispecigis nigran panon.

Ekkrakis la kroĉanso de la pordo, senĉese kovrita per pajlo, surkudrita per kruda tolo, kaj la dommastrino eniris.

»La leterportisto lasis por vi leteron, laŭdire el Praha de la filo; li estas jam eble altranga sinjoro kaj skribas, ke vi baldaŭ transloĝiĝu al li!«, la dommastrino parolis per ironia voĉo.

Pacaĉka forgesis trinki lakton kaj rapidis al la vazarŝranko, elprenis malnovan tason kaj el ĝi du krejcarojn. »Mi sincere dankas al vi, najbarino!« Ŝia voĉo sonis milde, sed riproĉeme. La virino eĉ ne rigardante en okulojn de la maljunulino prenis de ŝia malgrasa mano krejcarojn kaj foriris.

Pacaĉka forgesis trinki lakton kaj rapidis malfermi la leteron kaj per mallaŭta voĉo si-

Apud tiu grandegulo ni aspektis kiel formikoj. Danke al unu havena oficisto, kiun ni renkontis kaj kiu ankaŭ estis samideano ni povis eniri en konstruaĵon, kie troviĝas kvar grandegaj elektraj ĉerpijoj de akvo el la seka doko. Ĉio estis por ni nova, mirinda, giganta. Kiel fermo de la havena vizito estis motorboata vojaĝo sur la rivero Skeldo. Nur nevolonte ni forlasis la havenon, kiu havis por ni tiom da interesajoj, pasante preter multegaj maristaj kafejoj kaj domoj de ĝojo...

Ni eniras en la magistratan domon, ĉar s-o Schoofs, nia bonega, lerta kaj senlaca gvidisto, kiu scias pri ĉio informi, ĉion fari komprenebla, volas montri la internon de ĝia vestiblo. Sed, estante informita de la pordisto, alvenas sinjoro, kiu alparolas nin esperante. Ĝi estas la direktoro de urbaj oficoj. Ankaŭ li estas tre afabla, kondukas nin en diversajn halojn, el kiuj ĉefe nin interesas la halo por edziĝaj ceremonioj civilaj. La bildoj sur la muroj prezentas edziĝon en diversaj epokoj de la homaro.

De la magistrata domo ni baldaŭ venas al la katedralo kun 126 m. alta turo. Ni suprenrampas ĝin kuraĝe kaj nia peno estas rekompencata de belega vido je la tuta urbo kaj vasta ĉirkaŭaĵo; de la belega spektaklo ni eĉ ne povas nin forŝiri. Sed malŝato ordonas iri en restoracion por tagmanĝi.

Posttagmeze ni vizitis la muzeon Plantin-Moretus. Ĝi estas presista muzeo, kiu dum kelkaj jarcentoj apartenis al la familio, laŭ kiu ĝi havas sian nomon.

labumis karajn liniojn de sola animo sur la mondo, kiu ŝin vere amis.

Tuj post la tralego de unuaj linioj ekstremiĝis ŝiaj manoj, en ŝia kapo malheliĝis kaj la papero falis sur la tablon; sur maljuniĝintaj vangoj ruliĝis du larmoj negrandaj — la larmoj de maljunaj homoj estas malgrandaj, sed pezaj; la sufero, kiu ilin kaŭzis, estas en ili kvazaŭ kristaligita...

Post momento komencis la maljunulino denove silabumi.

Multe, malgaje plendis la malproksima filo. La ĉitutaga vivo estas terura penado en la kancelario kaj la salajro tiom malalta, ke apenaŭ trifoje tage estas eble satmanĝi. Ankaŭ nokte estas necese labori, kaj ŝpari eĉ unu groŝon ne estas eble por povi plenumi la ekzamenojn kaj da tempo por la preparado ankaŭ ne restas.

Denove falis la letero sur la tablon kaj la maljunulino interplektis la manojn tiel forte, ke la ostoj ekkrakis. Kvazaŭ muta ŝi poste rigardis momenton en la malplenon. Ankaŭ ŝi apenaŭ trifoje tage satmanĝas, sed ŝi ja estas maljuna, simpla persono — sed li, ŝia sola, karega infano... Malnova, nigriĝinta mura horloĝo jam longe pasis kaj la maljunulino ankoraŭ sidis ĉe la tablo; post la momento kvazaŭ senkonscie ŝi alvenis al la vazarsranko, prenis malgrandan taseton sen la tenilo, elŝutis ĝian enhavon sur la tablon kaj kalkulis. Da arĝentaj kaj kupraj moneroj estis ankoraŭ tre malmulte. Kaŝinte denove sian trezorujon, la maljunulino sidiĝis, metinte

manojn sur la tablan tabulon kaj sur ili sian kapon.

La horloĝo tiktakis kaj la fringo ekstere kantis.

Kroĉanso de la pordo ekkrakis kaj en la ĉambron eniris nekonata homo kaj afable salutis.

»Estu bonvenanta!«

»Maljunulineto, mi estas haraĉetanto kaj mi aŭdis, ke vi havas plej belan grizan hararon en la tuta vilaĝo. Mi ĝin aĉetus kaj sufiĉe pagus por ĝi — ĉu vi vendus ĝin?«

»Hararon?« Pacaĉka ekrigardis mirigite la fremdulon.

»Jes, maljunulineto, kion ĝi signifas por vi, sub la kapotuko neniuj rimarkos, ke vi ĝin ne havas kaj monon vi certe bezonas.«

»Jes,« mallaŭte diris la maljunulino, »sed kion vi kun ĝi faros?«

»Mi ĝin denove vendos; ne al ĉiu kreskas tiom da haroj kiel al vi, kaj en la urboj preferas la sinjorinoj riĉan hararon — tial ili aĉetas fremdan.«

Pacaĉka demetis sian kapotukon.

La pupiloj de la haraĉetanto pligrandiĝis pro surprizo, ĉar la maljunulino havis vere malofte videblajn grizajn harojn, blankajn, kvazaŭ blanka floreto de la fragujo, delikatajn, kiel silkaj fadenoj kaj krom tio longajn.

»Kvin guldenojn mi al vi donos, jen, vidu, tute novan bankbileton!«

La maljunulino enpensis. Ŝi rememoris, kion diros ŝia mortinta edzo, ĝis ŝi al li venos kun kapo senhara kaj — ĉu li ŝin ekkonos?

En vastaj haloj de la domo estas malnovaj, bone konservitaj presmaŝinoj, kompostejoj kun grandega stoko da diversepokaj presliteroj, kliŝaĵoj por bildoj de famaj pentristoj. En vitritoj oni vidas fakturojn de Rubens por liaj bildoj liveritaj al la presejo, diversajn librojn el diversaj epokoj tie ĉi presitaj. Sur bretoj estas amasego da libroj, kvazaŭ en iu granda librovendejo: la pupitroj, la tabloj, la seĝoj estas konservitaj tiel bone, ke vi havas imagon, ke la personoj tie ĉi okupitaj foriris antaŭ momento... La muzeo estas kvazaŭ lernejo ne sole por gazetisto, sed eĉ por ĉiu klera homo.

Vespero kunvenigis nin en kafejo »Suisse«, kie estis okazonta publika parolado pri Ĉeĥoslovakujo. Kiam ni alvenis, la halo estis jam tute plenigita de publiko. La necesajn diapozitivojn mi kunportis. Ilin havigis al ni nia ministerio por eksterlandaj aferoj. La »Reĝa societo de Fotografarto kaj Sciencaj studoj de Antverpeno«, kiu kunhelpis la aranĝon de la parolado, pruntis sian aparaton. Mi parolis esperante, s-o Schoofs tradukis flandren. Estis kelkaj minutoj post 22. horo, kiam ni finis, estante ambaŭ spirite lacigitaj. Simila parolado estas tre elĉerpiga, ĉar se alia persono interrompas per tradukado la fluon de la pensoj, oni devas tutan spiritforton firme koncentrigi. S-o Schoofs uzis tiun ĉi okazon por propagando, menciante poste la grandan utilecon de Esp. dum vojaĝoj. La publiko ne ŝparis aplaŭdon kaj tial ni ambaŭ estis kontentaj.

Post la parolado la esperantistoj denove kunvenis en amika rondo. Denove oni rakontis, babilis, kantis. Jen mi petis la flandrajn samideanojn kanti iliajn naciajn kantojn kaj ili plenumis mian peton. Ni spertis, ke iliaj kantoj estas tre melodijaj, ili tuŝas koron.

Estis tempo por adiaŭi. Multaj samideanoj akompanis nin al nia hotelo kaj tie al ni promesis en la venonta jaro viziti nian landon. Ni premis iliajn manojn kvazaŭ al fratoj kaj ŝajnis al ni, ke ni lasis ĉe ili pecon de nia propra koro. Por rememoro ni donacis al ili nian nacian flagon. Delonge mi jam kuŝis en la lito kaj ĉiam ankoraŭ sonis al mi en oreloj melankolie dolĉa melodio de »Flandra Leono«. Mi ne komprenis kaj ne komprenas, kial tiu ĉi bonkora kaj klera nacio devas batali por sia nacia universitato kaj kial ĉi tiun memkompreneblan postulon oni ne volas plenumi...

Matene ni forveturis al Ostendo kaj poste al Bruĝo, kie f-ino Y. Thooris, deleg. de U. E. A. estis nia fabla gvidantino kaj bonkora s-o Verbecke, posedanto de esp. hotelo »Cornet d'or«, nia gastiganto.

Ni revenis el Belgujo plenaj de entuziasmo por Esperanto kaj por tiu lando, kiu nin gastigis. Ĝi kresku, floru. Al ĉiuj samideanoj, kiuj al ni estis tre, tre afablaj, koran dankon por ĉio! Al s-o Schoofs kaj al lia ĉarma edzino ni neniam povos sufiĉe danki por ilia afableco, kiu vere estas senkompara! Manpremon! Je revido!

Ĉu li ne riproĉos ŝin pro tio? Sed en la sama momento aperis en la grizhara kapo alia penso. Ŝi vidis modeste aranĝitan ĉambreteton, lumigitan per la lampo sur tablo staranta kaj ĉe la tablo, super la paperoj kliniĝantan palan kapon de la solinfano.

»Mi vendos miajn harojn, prenu ilin, sed nur ne trompu min!« Ŝia voĉo estis laŭta, kvazaŭ gaja.

La tondilo ekbrilis kaj la longaj harfaskoj serpentumis en la manoj de la tondanto kiel malgranda volvaĵo.

La haraĉetanto foriris kaj la maljunulineto denove kalkulis sian tutan riĉaĵon. Poste ŝi denove eksidis ĉe la fenestreto kaj ankoraŭ foje silabumis la leteron de la filo:

»Mia kara patrino, se Vi sciis, kiel malbone mi fartas! Kiel ĝoje mi ekkurus al Via dometo kaj mian febrevarman mortlacigitan kapon kliniĝus al Via kaj kiskus Viajn longajn, delikatajn, arĝentajn harojn!«

La sinjorino, kies kapon ornamas bela griza plektaĵo de tiu kapo de la ĉeĥa maljunulino, povas esti fiera!

Tradukis Sidonie Dlouhá.

LEGOLIBRO.

Legendo pri Macocha.

(Macofia, esperante »Duonpatrino«, profunda abismo en Moravia Karsto.)

En vilaĝo Vilmovice vivis iam unu ministro kun siaj edzino kaj malgranda knabeto. La edzino post nelonge mortis kaj la ministro post unu jaro denove edziĝis. La nova patrino ne amis la knabeton kaj kiam al ŝi naskiĝis knabino, ŝi eĉ komencis forte malami la malpropran fileton. Okazis, ke la knabino danĝere malsaniĝis kaj iu vilaĝa virino konsilis, ke helpos floro kreskanta en proksima arbaro. La patrino iris tien, sed vane ŝi serĉis, la floron ŝi ne trovis. Kiam ŝi revenis hejmen, la knabineto fartis ankoraŭ pli malbone. Kaj tiam la patrinon kaptis terura ideo: eble la filino resaniĝos se ŝi senigos sin de la malpropra infano.

Posttagmeze ŝi diris al la knabo: »Iru kun mi, ni serĉos la floron kiu sanigos vian fratineton!« La knabo ekĝojis kaj iris kun la patrino. Longe ili serĉis en la arbaro, ĝis ili alvenis al profunda abismo. »Rigardu jen ĝi kreskas!« — diris la patrino montrante iun herbon kreskantan sur la rando de la abismo — »deŝiru ĝin, mi tenos vin je mano por ke vi ne falu malsupren.« La knabeto volis rapide deŝiri la kreskaĵon, sed la duonpatrino ekpuŝis lin kaj li renversiĝis en la abismon.

Kiam la patro hejme demandis, kie estas la knabo la patrino respondis, ke li iris al la avino en Ostrov Frumatene ministroj irantaj al sia laboro prefer la abismo, ekaŭdis el la interno mallalitan infanan ploradon. Post pena serĉado ili ekvidis infanon pendantan sur arbeto kreskanta ĉe rando de abismo. Ili alportis ŝnuregojn kaj savis la infanon. En tiu sama tempo aŭdiĝis ekkrio sur kontraŭa rando de la abismo kaj la ministroj ekvidis virinon havantan infanon en siaj brakoj, kiu sin ĵetis en la abismon. Ĝi estis la duonpatrino kun sia filineto, kiu nokte mortis...

De tiu tempo la abismo estas nomata Macocha — Duonpatrino.

Mařka Kubásková.

ALIĜU AL Ĉ. A. E.!!

Arabo kaj lia ĉevalo.

La suno subiris kaj alproksimiĝis la nokto. La granda silento de dezerto estis interrompata de singultado de juna araba virino, kiu sidante antaŭ sia tendo, ploris. Iliaj infanoj starantaj ĉirkaŭe, observis ŝin sendemande kaj iliaj okuloj montris la doloron de la patrino: estis dolore por ili vidi la patrinon ploranta.

Subite la juna virino starigis kaj observis horizonton. Ŝia bela vizaĝo heliĝis pro espero. Kio kaŭzis la subitan ŝanĝon? Ni lasu paroli la familiestron, kiu kelkajn horojn poste estante ĉirkaŭita de sia edzino kaj la infanoj jene rakontis:

»Revenante el sukcesplena ekspedicio kontraŭ la gento de Beni Buzufes, ni renkontis kavaleristojn de Abd-el-Kader proksimume du horojn de tie ĉi Tuj, kiam ili nin ekvidis, ili sin ĵetis kontraŭ nin. Ni defendis nin heroe, sed kion povas fari unu kontraŭ dek?! Ni penis vendi malkare niajn vivojn. Miaj kunuloj jam ĉiuj estis falintaj kaj mi restis sola, defendante min ankoraŭ, malgraŭ du profundaj vundoj. Sed estante senfortigita, ankaŭ mi falis. La mamelukoj sin tuj ĵetis sur min, katenligis min kaj sidigis sur kamelon. Ili prenis kune ankaŭ mian ĉevalon. En vespero de la dua tago ni ekhaltis apud X..., por tie bivaki. Mi kuŝis antaŭ la tendo, en kiu dormis la mamelukoj, havante manojn kaj kruojn ligitajn per leda zono. Mi ne povis dormi pro doloro kaŭzita de miaj vundoj, kiam mi ekaŭdis blekon de mia ĉevalo inter aliaj ĉevaloj ligitaj ĉirkaŭ la tendoj. Mi ekkonis ĝian voĉon kaj mi ne povis rezisti la deziron ankoraŭ unufoje paroli al mia fidela kunulo. Mi trenis min pene ĝis al li. »Mia bona amiko« — mi diris — »kiel vi fartas inter la mamelukoj? Mia edzino kaj la infanoj ne plu donados al vi la lakton de kamelo, ili ne plu donos al vi la avenon sur siaj manplatoj, vi ne plu kurados libera en dezerto. Sed se mi estas sklavo, vi restu libera.« Poste mi sukcesis tramordi ledan zonon per kiu ĝi estis ligita kaj mia bona kunulo estis libera. Sed vidante min sangumitan kuŝi inter siaj piedoj, la fidela besto komprenis tion, kion mi ne povis diri al ĝi per la buŝo. Ĝi klinis la kapon, flarumis min kaj preninte en dentojn la zonon, kiun mi havis ĉirkaŭ mia korpo, ĝi ekgalopis kaj forportis min ĝis tien ĉi. Tion ĝi faris, por ke viaj larmoj sekiĝu. Vi kredis, ke mi estas perdita, sed vi retrovis min, mia kara edzino.«

Metinte sian mastron al la piedoj de liaj edzino kaj infanoj, la ĉevalo mortis pro laciĝo.

La Galoj.

La bela lando, kiu nun estas nomata Francujo, iam havis la nomon Galujo. Francujo apartenas al la plej kulturitaj landoj, sed Galujo en pli granda parto estis nekulturita. Imagu al vi sur la loko de la kampoj kaj de la vinberejoj, kiuj estas la fonto de la franca riĉeco, nur vastegajn marĉejojn kaj senfinajn arbarojn, kiuj malhelpis rilatojn inter diversaj gentoj. La belaj urboj kaj pitoreskaj vilaĝoj, kiuj nun estas dissemitaj sur la tuta franca teritorio, tiam ne ekzistis; nur izolitaj dometoj aŭ kabonaj formantaj vilaĝetoj estis troveblaj sur bordoj de riveroj, sur plataĵoj inter arbaroj aŭ sur insuletoj en marĉejo.

La popolo, kiu loĝis Galujon estis galoj, homoj de alta staturo kaj de larĝa brusto. Ili havis longan

barbon kaj riĉan blondan hararon. Ilia kostumo konsistis el pantalone kaj jaketo. Ilia civilizacio estis jam iomete progresinta: unuj okupis sin per ĉasado, aliaj kulturis la teron aŭ okupis sin per industrio. Sendube ilia scio de agrikulturo kaj de industrio estis tre primitiva, sed tamen ili sciis fari kaj prilabori metalojn.

Grandaj arbaroj servis al la galoj kiel templo, ĉar ili kredis, ke la adorado de dioj ne devas okazi en konstruaĵoj faritaj per homa mano. Ili ĉefe adoris la kverkon, kiu estis en iliaj okuloj simbolo de forto kaj tial eĉ simbolo de Kreinto.

La pastroj de galoj estis nomataj »druido« (france: druides). Ilia povo estis preskaŭ senlima, ĉar ili okupis ne sole la funkcion de pastroj sed eĉ de profetoj, de sciencistoj, de kuracistoj kaj de instruistoj. Iliaj kunvenoj okazis ankaŭ en arbaro. La religio instruata de druido estis kruela. Ĝi ofte ordonis homajn oferojn. Kiam dum la milito oni alkondukis kaptitojn, ili estadis premsufokataj sur roka altaro. Ankoraŭ nun en Francujo oni trovas monumentojn faritajn el ŝtonegoj, kiuj servis por altaro.

La galoj estis tre militemaj kaj batalis tre brave. Sed tio al ili ne malhelpis esti ankaŭ tre gastamaj. Se iu fremdulo ilin vizitis, ili gastigis lin per senfinaj manĝoj. Iliaj posteuloj bone konservis ĉi tiun karakteron, ĉar nenio estas pli kora, ol la franca gastamo.

KULTURO

Memorindaj datoj en Decembro. La 2. d. 1805 okazis »la batalo de tri imperiestroj« apud la Moravia urbo Slavkov (germ. Austerlitz). — La 4. d. 1798 mortis L. Galvani, la eltrovinto de elektro. — La 6. d. 1414 Johano Hus estis en Konstanz malliberigita. — La 7. d. 1894 mortis F. Lesseps, la konstruinto de Suez-kanalo. — La 10. d. 1896 mortis A. Nobel, la eltrovinto de dinamito. — La 12. d. 1586 mortis St. Báthory, la eminenta pola reĝo. — La 13. d. 1797 naskiĝis J. Heine, la fama germ. poeto kaj satiristo. — La 15. d. 1230 mortis ĉeĥa reĝo Přemysl Otakar I., la fama amiko de germanoj. — La 15. d. 1859 naskiĝis en Bjalostoko Dr. L. L. Zamenhof, la fama aŭtoro de Esperanto. — La 16. d. 1911 Amundsen atingis la sudan poluson. — La 17. d. 1851 estis K. Havlíček, la ĉeĥa ĵurnalistoj forveturita al Brixen. — La 21. d. 1765 mortis Prokop Diviš, la eltrovinto de fulmoforigilo. — La 23. d. 1466 la ĉeĥa reĝo Jiří z Poděbrad estis de papo eksigita. — 24. d. 1524 mortis Vasco de Gama, kiu ĉirkaŭnaĝis Afrikon. — La 27. d. 1571 naskiĝis J. Kepler, la fama astronomo. — La 28. d. 1856 nask. W. Wilson, la prezidinto de Usono. — La 31. d. 1384 mortis John Wyckliffe, la angla eklezia reformisto.

La laboro de la koro. Ĉiu »frapo« de la homa koro daŭras proksimume unu sekundon, sekve en unu horo la koro faras 3600 frapojn, en unu tago 86.400. Ĉiu frapo de la koro enpuŝas en arteriojn proksimume 70 gramojn da sango. La sango de matura homo pezas proksimume 14 kilogramojn kaj tiu ĉi kvanto rondiras tra nia korpo 25 foje en unu horo. Do, la laboro de la koro estas sufiĉe granda.

La aĝo de balenoj. Same kiel la aĝon de ĉevalo oni certigas laŭ ĝiaj dentoj, oni povas fiksi la aĝon de balenoj laŭ la grandeco de ĝiaj buŝostoj. Laŭ tiuj ĉi signoj oni trovis, ke la balenoj atingas la aĝon de 300—400 jaroj, eĉ pli.

La tanita homa haŭto. Strangan kulturan noton enpresigis en la revuo »Zvon« la estro de la muzeo en Rakovník (Boĥemujo). Laŭ lia raporto iu ledotano en Rakovník en la XVI. jarcento tanis krom la bestaj haŭtoj ankaŭ haŭtojn homajn. En la jaro 1558 la bridofaristo Mates havis en sia magazeno kvin tanitajn homajn haŭtojn. Ilin ĉefe uzadis razistoj por akriigi la razilojn!

DIVERSAĴOJ

Internacia scienca asocio jam efektive ekfunkciis. La unua kajero de ĝia organo »Internacia scienca revuo« (n-roj 1—3) aperis en eldonejo T. Jung, kaj ĝi pravas la zorgemon kaj seriozecon de la redaktantoj (Döhler, Róbin, Rollet de l' Isle, Wüster). La kotizoj por Ĉeĥoslovakio estas jenaj: Membroj Kč 18.—, Membroj abonantoj Kč 45.—, abonantoj Kč 36.—. Tiuj, kiuj siatempe anoncis sin ĉe mi kiel membroj aŭ kiel abonantoj, bonvolu sendi al mi la koncernan sumon, por povi regule ricevi la revuon. Dr. Stan. Kamaryt, Bratislava, Telocvičná 3.

Esperanto en mezaj lernejoj. La diversaj klopodoj de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista pri ĝusta apliko de konata dekreto pri fakultativa instruado de esperanto akiris sukceson tiom, ke la ministrejo en kelkaj lernejoj jam permesis ĝin laŭregule kiel laŭvolan fakon, el kiu la lernantoj estos ekzamenataj kaj ricevos noton, kaj la instruanto laŭlegan monan rekompencan. La detalan raporton kaj statistikon ni donos akirante ĉiujn bezonajn nombrojn. — Kamaryt.

Esperanta sekcio ĉe Centra societo de ĉeĥoslovakaj profesoroj (Ústřední spolek československých profesorů), la sola profesia organizaĵo de ĉeĥoslovakaj profesoroj en duagrada lernejoj en nia respubliko kun 4000 membroj, estis fondita la 1. de novembro 1922. Ĝi havas jam 21 aligintojn. Pro sia fakuleco ĝi certe ludos gravan rolon en organizo de instruado de esperanto en lernejoj, kaj oni devas atente sekvi ĝiajn iniciatojn. La protokolo pri la fonda kunveno, enpresita en la oficiala bulteno de la societo (Věstník československých profesorů 1922/23, n-ro 7-8), skizas gravan komencan laborprogramon. La funkciuloj de la sekcio estas: profesoroj: Rud. Fridrich, prezidanto, Dr. St. Kamaryt, sekretario, J. Houdek, protokolisto.

La ĉs. ministerio por instruado per sia decido la 13. de nov. 1922, n-ro 115.445 nomis s-on Aug. Pitlík, la ĉefkom. de Komerca ministerio en Praha, lektoro de Esperanto ĉe la alta teknika lernejo en Praha (fako VII.: specialaj sciencoj). Tiel ĝi aprobis la decidon de la profesoraro faritan la 4. okt. t. j. La prelegoj pri Esp. jam komenciĝis.

Nunaj Lingva-Komitatanoj.

(La nomoj de la Akademianoj estas distingitaj.) Arnhold (Dr. H.), Tiergartenstr. 32, Dresden, Germ. Aymonier (Cam.), Rue Ernest Cresson, Paris, Fr. Backheuser (E.), Escola Politeknika, Rio de Janeiro, Brazilio.

Bastien (M.), Rue de Vendenheim 7, Strasbourg, Fr. Behrandt (A.), Hohenstaufenstr. 24, Berlin W., Germanujo.

Bianchini (J.), Prada Clausetto, Udine, Italujo. Blaise (S-ino M.), Castle Way 10, Hanworth, Middlesex, Anglujo.

Bobin (M.), Rue Vital 21, Paris 16e, Francujo. Boucon (H.), Boul-d du Lycée 10, Annecy, H-te Savoie, Franc.

Bremón y Masgrau, Bruc 46, Barcelona, Hispanujo.
 Bulthuis (H. J.), Daguerrestr. 84, Hago, Holando.
 Bünnemann (O.), Alsterkrugchaussee 586, Hamburg,
 Fuhlsbüttel, Germanujo.
 Busuttill (S-ro G.), Sliemā, Malta.
 Butler (Montagu C.), Hart Str. 17, London W. C.,
 Anglujo.
 Cart (Th.), Rue Soufflot 12, Paris V., Francujo.
 Chavet (G.), Rue Caulancourt 57, Paris, Francujo.
 Christaller (P.), Weinsteige 61, Stuttgart,
 Germ.
 Codorniu (R.), Malecon 6, Murcia, Hispanujo.
 Corret (D-ro P.), Boul-d de la République 19,
 Versailles, Francujo.
 Couto Fernandez (A.), Lavanjeiras 225, Rio de Ja-
 neiro, Braz.
 Degon (P.), Rue Perronet 54, Neuilly s. Seine, Fr.
 Delvaux (L.), Boul-d Joseph II. 10, Charleroi, Belg.
 Dombrowski (A.), Gr. Vilnastr. 34, Kaunas, Litovujo.
 Fischer (H.), Alea Suter 19, Bukarest, Rumanujo.
 Flourens (S-ino Roksano), Cours Joseph Thierry 43,
 Marseille, Francujo.
 Fridöri (H.), Schaffhauserstr. 15, Zürich, Svisujo.
 Furtado (Mur.), C-el Vicente 38, Porto Alegre, Br.
 Ghez (A.), Supera Poŝtdirekcio, Trieste, Italujo.
 Grau-Gazas (J.), Str. Villarroel 136, Barcelona, Hisp.
 Grosjean-Maupin, Rue du Val d' Osne 14, St.
 Maurice (Seine), Francujo.
 Hankel (S-ino M.), Nicolaistr. 18, Dresden, Germ.
 Inglada (V.), Estacion sisinalogica, Toledo, Hisp.
 Krestanoff (Iv.), Nicolaistr. 40, Dresden, Germ.
 Kühnl (E.), Cale Orfila 5, Madrid, Hispanujo.
 Lengyel (P.), Maria Valeria Telop allami uj lakás
 32/280, Budapest, Hungarujo.
 Lundgren (I.), Hedemora, Svedujo.
 Mann (W. W.), Dreilindenstr. 49, Nikolassee 6,
 Berlin, Germ.
 Mazzolini (A.), Reg. Scuola Norm. masch., Via di
 Cavour, Firenze, Italujo.
 Meazzini (E.), San Giovanni Valdarno, Italujo.
 Melckebecke (Dr. v.), Avenue de France 22, Anvers,
 Belgujo.
 Ménil (F. de), R. de l' Hotel de Ville 21, Neuilly s.
 Seine, Francujo.
 Millidge (E. A.), Starcross Midway Sussex Telpham,
 Anglujo.
 Mybs (D-ro), Marktstr. 68, Altona-Hamburg,
 Germanujo.
 Nylén (P.), Huddinge, Stockholm, Svedujo.
 Padfield (W. W.), Cedar Vilas 2, Bath, Anglujo.
 Parisot (J.), Rue des Brice 6, Nancy, Francujo.
 Privat (Dr. E.), Chemin de Roches 2, Genève,
 Svisujo.
 Pulvers (S-ino Ch.), Dornacherstr. 154, Basel, Svis.
 Reed (Edw. C.), 2518, 17th St. N. W. Washington
 D. C., Usono.
 Reed (S-ino Ivy Kellerman), ibid.
 Rohrbach (D-ro), Galbersweg, Gotha, Germanujo.
 Rollet de l' Isle, Rue du Sommerard 35, Paris, Fr.
 Sabadell (A.), Rambla Cataluña 54, Barcelona, Hisp.
 Schmidt (J.), Müslingweg 2, Bern, Svisujo.
 Schmidt (D-ro A.), Telegraphenberg, Potsdam, Ber-
 lin, Germanujo.
 Schröder (J.), Kaiserstr. 10, Wien VII., Aŭstrujo.
 Sebert (Gen-alo), Rue Bremonnier 14, Paris, Franc.
 Shafer (S-ino Ad.), Gloucester Crescent, Regents
 Park, London, Anglujo.
 Simon (O.), XIX., Billrothstr. 31, Wien, Aŭstrujo.

Sepulvada-Cuadra (L.), Calle de Madrid 1324, San-
 tiago de Cilio.
 Stojan (P.), Gimm. instr., Novi Bazar, Serbujo.
 Stroele (G.), Pierre qui roule 11, Neuchâtel, Svis.
 Tellini (A.), Gombruti 5, Bologna VI., Italujo.
 Török (P.), Meŝterstr. 1, Debreczen, Hungarujo.
 Uiterdyck (D.), Hiacintenlaan 3, Hilversum, Holando.
 Underhill (D-ro G.), Idaho Spring, Colorado, Usono.
 Verax (Ch.), Boul-d Aarago 35, Paris, Francujo.
 Villanueva (A. L.), Vergara 11, Murcia, Hispanujo.
 Wackrill (A. E.), Briardale Gardens 13, Hamp-
 stead, London n. W., Anglujo.
 Ward en (J. M.), cluny Drive 41, Edinburg, Britujo.
 Wenger (J.), Côte 113, Neuchâtel, Svisujo.
 Witteryck (A. J.), Steenbrugge (Bruges), Belgujo.
 Zamenhof (D-ro Leono), Marszałkowska 126, Var-
 sovio, Polujo.

Oni aldonu al tiu ĉi listo la nomojn de la Rusoj:
 S-roj Devjatnin, Evstiféjeff, Fiŝer, Kabanov,
 Mencil, Naumann, kiuj verŝajne ne estis atingataj
 de niaj cirkuleroj kaj leteroj kaj ne devas esti ri-
 gardataj kiel eksigintaj (Regularo VII. 9. 1º).

Eksigis (sed plej parte voĉdonis): S-roj Antilla,
 Baruel, Bricard, Carlos, Costa e Almeida, Fertar,
 Fructier, Mattov (g-alo), Mikolajski, Peregordo,
 Polgar, Pujula y Valles, Rust, Velten.

Mortis: S-roj. Benavente, Evrot, Fauvard-Basteul,
 Geyer, Grabowski, Meyer, Noäl (D-ro), Ostrow-
 ski, Stroela (Hermann), Villarect, Zakrzewski.

La ceteraj, kies nomoj ne troviĝas en la supraj
 listoj, jam de longa tempo, malgraŭ ĉiuj petoj, ne
 respondis la cirkulerojn kaj leterojn. Ili sekve laŭ
 Regularo VII. 9. 1. devas esti rigardataj kiel eks-
 igintaj.

Al sia kara honora prezidanto
S-O FRANZ DOLANSKY

kaj samideanino

F-INO ANNA HACKER

okaze de ilia gefianĉiĝo esprimas sinceran gratulon
 esperantistoj el Nýřany-Nürŝchan.

ALIĜU AL U. E. A.!!

Via horloĝo funkcios
 precize se vi ĝin donos por
 rebonigi al

FR. NOVÁK,
 horloĝisto en Praha I.
 Malé nám. 10.

Horloĝoj. - Juveloj. - Esp.
 insignoj de esp. klubo en
 Praha. - Esp. glumarkoj,
 kolekto da 12 div. specoj,
 100 pecoj Kč 4,-, afrankite
 Kč 5,-, 1000 pec. Kč 35,-,
 afrankite Kč 37.50.



Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. 10.
 Presis laborista presejo, Plzeň.